

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

Numero 10;

IKEF
★
1984

februaro, 1986.

Nova jaro; novaj esperoj; novaj taskoj.

Kiam antaŭ plena jaro ni kunmetis pensojn por esti la redaktora komentario, la perspektivo aspektis hele pro sinsekvaj aliĝoj dum relative mallonga tempodaŭro, pro relative granda aro de samideanoj aliĝantaj al la komuna tasko akceptigi la internacian lingvon, Esperanton, en la ligitajn kampojn de komerco kaj ekonomiko. Plena jaro pasis. Niaj pensoj nun okupiĝas pli pri niaj atingoj ol pri niaj aspiroj, kvankam ne eblas eviti la konstaton, ke niaj atingoj dum la pasinta jaro reprezentas, efektive, nur modestan progreson.

Se ni pensas strikte pri la nombro de aliĝintoj, ni devus agnoski, ke ni nur malrapide progresas. La nombro de membroj duobligis dum la jaro, ni konstatas, sed la komenca cifero estis tre modesta kaj duobligo ne reprezentas ion tre gravan. Sed tamen la nombro de membroj, kiuj jam pagis anticipe por plunjara membreco pli ol duobligis, kaj krome ni nun havas dumvivan membron. Tia fido en la estonteco de la Fakgrupo ja heligas la perspektivon por ni.

Antaŭ plena jaro, la ĉefa ero en nia laborplano estis atingi baldaŭan kunmeton de nova eldono de la fakvortaro pri komerco kaj ekonomio. Ne prezentas perdon por ni, ke tiu ankoraŭ estas la ĉefa ero en nia laborplano, ĉar intertempe ni faris signifajn paŝojn al kolektado de laborpretaj kunlaborantoj por la tasko. Ni rajtas esperi, ke tre baldaŭ la baza organizado de la laboro komenciĝos

tiel, ke vera interŝanĝado de nocioj komenciĝos. Konfesinde estas, ke nia kompreno de la amplekso de la tasko estas nun pli klara ol ĝi estis, kun la rezulto, ke ni lernis la metodon esti paciencaj, sen perdo, tamen, de niaj esperoj.

Kunmeto de la baza Statuto por la Fakgrupo, laboro kiu tiel okupis nian atenton en tiuj fruaj semajnoj de la pasinta jaro, finiĝis per akcepto, kun kelkaj ŝanĝetoj, dum la oficiala Fondkunveno en Aŭgsburgo. Sekvo estas, ke ni ĉiuj havas la senton, ke nia asocio jam estas longe establita, ke ni havas bazon solidan, kiu ebligas varbagadon kun plena fido pri la estonteco. Ĉu niaj varbmetodoj estas la plej efikaj, estas demando kiu nun okupas nin, sed ni ne plu pensas pri ĉu aŭ ne ni havas ion aliĝindan.

Nia organo estas ankoraŭ tre modesta. Ĝi estas tro modesta, oni rajtas argumenti; oni ja argumentas, ke ĝi devas esti multe pli ampleksa, por akcepti tiujn valorajn artikolojn kaj studraportojn, kiuj devas esti longaj por sukcese transdoni valorajn idearojn. Unu reago estis, ke nia organo sukcesis esti vere malprestiga, se ni povas kompreni la signifon de tiu esprimo. Sed prestiĝa aspekto eble ne estas nia celo, kaj en tiu kazo oni rajtas demandi, kion ni atingis per nia Laŭokaza Novaĵletero.

Rigardita de la redaktora seĝo, nia modesta organo sukcesas prezentati modelan miksaĵon de novaĵeroj kaj fakaj aliĝoj, kiujte sur inter-

ŝanĝado de ideoj, de kiu nur parto atingas la kolumnojn de la organo mem. Kaj tute intence ni provas prezenti modelan lingvaĵon en ĉiuj aspektoj de gramatiko kaj vortelekto, de ortografio kaj interpunkciaĉo.

Trafa ekzemplo de la evolupaŝoj pri la LN-o estas la enkonduko de reklamanoncoj kaj anoncetoj. Legantoj rajtas pensi, ke la nivelo de akcepto estas ankoraŭ tre modesta, sed inter la reagoj pri eĉ tiu modesta rezulto estas propono, kiu eble montras la estontan vojon. Necesas jam pensi, skribis nia reaganto, pri regule eldonita ĵurnalo plena je reklamanoncoj kaj anoncetoj, en tia eldonkvanto tra tiom da landoj, ke entreprenoj diversaj pretus pagi komerce realan kotizon por uzado de spaco tie.

Iom fora revo, vi pensas? Ni kunsentas kun vi, sed tamen la fakto ke tiu reago venis donas rajton de espero, ke nia nuna modesta stadio de atingo estas nur la unua ŝtupo de sur kiu ni baldaŭ saltos por atingi pli altan ŝtupon.

Meze de la ĵuspasinta jaro, ni kunmetis 'pensojn de pseŭdoredaktoro', kun, inter alie, la intenco instigi legantojn libere prikomenti tiujn niajn pensojn, por montri erararojn aŭ proponi modifojn. Konfesinde estas, ke la nuraj reagoj venis de personaj amikoj, kaj tiuj ne permesis al si kritikajn komentojn. Interesa hazardaĵo estas, tamen, ke lastatempe ni ja komencis rifuzi proponitajn tekstojn, pretendante, ke iline atingas la bezonatan nivelon. En aliaj kazoj, ni akceptis la tekstojn nur kondiĉe, ke ni havus la rajton iom draste redakti ilin. Tute alia kazo estis tiu de artikolo, kiu ja volis proponi modifojn en la Fundamento de Esperanto, pretekste, ke en la nuna mondo la malnova alfabeto ne plu taŭgas, ĉar komputoroj kaj aliaj tekstmanipuladaparataroj ne kapablas manipuli ĝin. Ni povas nur esperi, ke nia rifuza respondo al la proponinto ne kaŭzis ian ofendon!

Ni jes sukcesis kaŭzi ofendon al alia korespondanto, kiu proponis al ni broŝurojn por recenzo, sed volis, verŝajne, ke ni ne taksu la

130

kvaliton de la varo sed simplaŭdu ĝin ĉar la lingvo uzata estas, (proksimume!), la internacia lingvo Esperanto. Kaj ni ricevis seriozan plendon, ke nia sinteno pri la erara uzado de oblikvaj strekoj anstataŭ kurbaj krampoj por indiki parentezon estas tro rigida. La plendanto volas, ke ĉar en tiu lando skribmaŝinoj ordinaraĵoj estas ekipitaj per klavoj por kurbaj krampoj, ni akceptu malpli altan kvaliton de la lingvo el tiuj kaj similaj landoj.

Iom pli longa estas la listo de tiuj korespondantoj, kiuj legis plendon de ni, ke ili malgustan signon por la 26-a litero de nia alfabeto.

Temo kiu eble okupos nin en la baldaŭa estonteco estas tiu de sen-erara uzado de valutonomoj kaj mal-longigoj por valutonomoj, du skribado en la internacia lingvo.

Fone al la tuto de tiu ĉi diskuto estas la penso, ke eble la redaktoro de revueto tiel modesta kiel la nia ne havas la rajton postuli altnivelan kvaliton, kia temas pri lingvo, kiun ni proponas por esti la ĉiutaga interkomunikilo inter komercistoj kaj aliaj tre okupitaj homoj. Estus interese konstati, ĝuste kiom estas la subteno por nia starpunkto!

La nova jaro portu sanon, prosperon kaj feliĉon al ĉiuj legantoj por ke ili frontu kun plifortigitaj energio la taskojn antaŭ ni starantajn!

- - - - - oo - - - - -

Limdato por la proksima Novaĵletero estos la 31-a de marto, tie en Roterdamo.

Respondeca redaktoro kaj eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero estas S-ro Lawrence Mee.

La poŝtadreso de la Fakgrupo:

Fakgrupo Komerca,
Postbus 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Letero al la Redaktoro:

- Optimismo ne sufiĉas! -

Mi povas plene subteni la enhavon de la letero en LN 9 de S-ro T. Radisavljevic.

Ni devas efektive uzi la Internacian Lingvon ĉie, kie tio eblas. Sekve: ne nur dum Esperantistaj kunvenoj, kiel multe da maljunaj Esperantistoj faris ofte kaj ankoraŭ hodiaŭ faras.

Multaj Esperantistoj esprimas miron, kiam mi diras ke mi ekzemple teletajpas komerce en Esperanto, tiu praktika uzado devus esti kutima afero inter E.-istoj, ĉu ne?

Kiam mi petis informojn, faldfoliojn, ktp, al turistoficejoj eksterlandaj, kaj simile, ĉiam mi uzis E.on kaj ... ĉiam sukcesis!

Ofte mi rakontas al ne-Esp-istoj pri mia ampleksa korespondado eksterlanda, kaj ĉiam venas al mi la demando: "Ĉu vi konas multajn lingvojn?" Tiam estas precize la momento por mi paroli pri la internacia helplingvo.

Vere, faciluzaj poŝvortaroj estas necesaj. Esperanto ne estas nia celo sed ĉiam aktuala helpilo, ("Internacia "L"ingvo"), por mondvasta ĉiutaga uzado!

Paul Seesink,
Nederlando.

- - - - - oo - - - - -

Internacia Akademia Konferenco pri scienco kaj tekniko en Esperanto; 22-a ĝis 24-a de julio, '86 en Beijing, Ĉinio, organizita de STEA sub ĈS.

La Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, decidis okazigi Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en 1986 en Pekino.

Temo: la hodiaŭaj kaj morgaŭaj scienco kaj tekniko.

Oficiala laborlingvo: Esperanto.

Sciencistoj kaj teknikistoj estas invitatataj proponi tezojn por diskuto. Pliaj detaloj estas haveblaj ĉe IKEF en Roterdamo.

- - - - - oo - - - - -

OFICIALAJ INFORMOJ
de la

AKADEMIO de ESPERANTO.

Nova serio, n-ro 4;

novembro, 1985.

Komuniko elsendita sub la respondeco de la Prezidanto de la Akademio, D-ro A. Albault, Francio.

La Akademio vokas ĉiujn Esperantistojn doni sian tutan atenton al la jenaj:

REKOMENDOJ pri la LANDNOMOJ.

1. Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŭga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.
2. En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ inter la uzo de unu kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.
3. La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilato inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e: Angl-ujo/-io -- angloj, kaj en la alia kategorio: Nederland-o -- nederlandanoj.
4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufikse uzata fremda vorto, (-io, -(i)stano, ...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

- - - - -

Noto de la Redaktoro de la LN-o.

Kun iom da fiero ni rimarkas, ke la landnomoj uzataj en niaj kolumnoj neniel pekas kontraŭ tiuj ĉi rekomendoj. Al la listo de landnomoj uzataj ni aludis en LN-o 6 de junio pasintjare. Ni nun aldonu al nia listo de taskoj, tiu de akceptigo de la Rekomendoj de la Akademio.

- - - - - oo - - - - -

Enkonduka studo pri eblecoj de ekonomia komparado de firmaoj.

Multaj entreprenestroj okupiĝas pri komparado de siaj funkciado kaj rezultoj kun similaj karakterizaj indicoj de aliaj firmaoj. Do eble ne estas seninterese prezenti kaj konsideri kelkajn demandojn rilate al la fontoj, malfacilaĵoj, metodoj kaj eblaj sukcesoj de tia komparo. La prezento povas esti ĉi tie nur mallonga, ĉar pli profundaj detaloj bezonus longan eksplikadon.

Por multaj firmaoj fronte al ŝanĝoj, povas agi kiel mezurstangoj kaj ideovekiloj la publikigitaj informoj de aliaj fakaj entreprenoj. Ĉiu entreprenado devas mem efekti la plej taŭgajn el aliaj fakfirmaoj por la komparado. Tia analizo de la rezultoj de aliaj firmaoj povas helpi ne nur en la plibonigo de la propra laboro, sed ankaŭ antaŭenirigi la interrilatojn kun la elektitaj entreprenoj.

La bazoj de la komparo povas esti unupartite tiuj entreprenaj jarfinaj raportoj, kiujn la firmaoj publikigas laŭ leĝaj preskriboj en la propra lando. Aliaj estas uzeblaj aliaj, en la fakliteraturo publikigitaj, informoj kaj indicoj de la naciaj statistikaj donitaĵoj. Per tiaj raportoj, la publikiganta firmao povas pligrandigi sian bonfamon kaj eble la sukceson de siaj interrilatoj.

Konekse kun la komparado de la indicoj de du firmaoj, kaj kun la rilatataj influantaj faktoroj en tia komparado, ĉi tie mi listigas kelkajn malfacilaĵojn:

- la diversaj firmaoj agas en malsama ekonomia medio, kaj verŝajne inter diferencaj produktoj kaj merkataj eblaĵoj;

- la signifo de la indicoj de akciaj societoj, laborantaj en diversaj landoj, ne estas tute samaj;

- la enhavo kaj la detalado de la Bilanco povas esti malsamaj eĉ inter en-la-sama-lando-registritaj entreprenoj; ili dependas inter alie de la grandeco kaj aĝo, de la

tradicioj kaj organizoformo, kaj de la internaciaj rilatoj de la entreprenado, ktp;

- la influo de la profilstukturo estas malfacile demonstrebla;

- la objektivaj ŝanĝokalkuloj por la indicoj de laŭtempaj datenserioj estas nur malfacile troveblaj;

- la produktoteknologio kaj la organizado de la firmao sub ekzameno ne povas esti detale konstatataj.

Malgraŭ la listigitaj kaj krome multaj aliaj malfacilaĵoj, estas malkovreblaj tiuj indicoj, sur kiuj povas baziĝi la plua laboro. Por ĉi tiu celo estas uzeblaj ĉefe la pocentaj indicoj kaj laŭtempaj datenserioj diversaj.

Grava antaŭkondiĉo de ĉi tiu laboro estas, ke la analizanta entreprenado, por elformi novan enhavon de propraj indicoj, pretas malkomponi tiujn proprajn indicojn.

Poste, tiuj havigitaj informoj estos utiligeblaj ankaŭ eksteren. Ili povas helpi la iniciatadon de pli proksimaj interrilatoj aŭ kunlaboroj kun aliaj entreprenoj.

Estas memorigenda, ke tiaj ekzamenoj, ĝuste pro la karaktero de la publikigoj, neniam povas malkovri tiujn faktorojn, kies ekkoncepto perturbus la publikigantan firmaon.

Fine, necesas akcenti, ke necesaj indicoj estas elektendaj laŭ la momenta situacio de la analizanta firmao, kaj ke ne ekzistas ŝablonoj por komparadoj. Sed ĉi tiu ne signifas, ke kelkaj elementoj ne estas antaŭe prilaboreblaj. Tiuj antaŭe pretigitaj indicoj estas poste multaspece aplikeblaj.

La tuta komparado bezonas, (kiel multaj aliaj ekonomiaj kalkuloj) unuflanke precizon en la preparofazo, kaj aliflanke certan malflekseblecon ĉe la kalkuldecidoj.

Peter Nada

Budapeco,
novembro, 1985.

RECENZO.

Nenio sciinda mankas tie ĉi.

Labores con cabos, (laborante per ŝnuroj); Luis Gilperez, 1985. E.L.C.: Ediciones Penthalon, S.A., Madrid, Hispanio. 195 x 130 mm-oj; 120 paĝoj.

Ni rajtas preni apartan plezuron kunmeti recenzon pri tiu ĉi libro, ĉar la aŭtoro estas membro de nia Fakgrupo. (Pli precize: S-ro Gilperez estas la nomita reprezentanto de nia membro: Instituto Dex, en Sevilla.)

Pri la lingvaĵo de la libro ni ne rajtas komenti, ĉar ĝi estas en la hispana lingvo, kiun ni ne regas, sed ni tute rajtas aplaŭdi la enmeton de modesta 'Ŝnurara terminaro, Hispana-Esperanta', je la fino de la verko. La cellegantaro estas evidente la montgrimantoj kaj aliaj partoprenantoj de sportoj sur deklivoj krutaj kaj ne-tiel-krutaj. Tra naŭ ĉapitroj, riĉe ilustritaj, la leganto havas manlibron pri la tuta arto uzi ŝnurojn en tre diversaj kampoj: identigo de ŝnuro-tipoj kun takso de kapablecoj; ŝnuroprizorgado kaj portado; uzado sporta kaj tenduma, por hisgado kaj vivsavado, kaj tiel plu. Ŝajne nenio sciinda mankas tie ĉi.

La aŭtoro invitas la Fakgrupon traduki la verkon kaj ĝin eldoni; ĉiuj rajtoj en tia eldono estus rezervita por ni. Ĉu ni havas sinproponon entrepreni la laboron?

Ĉiaokaze, la Fakgrupo fieras pri tiu ĉi grava atingo de unu el niaj Membroj, kaj volas por la aŭtoro ĉian sukceson, ne malĉefe komercan!

lm

- - - - - oo - - - - -

Lastmomenta novaĵero !

Atendu la baldaŭan aperon de prestiĝe presita kaj enhavoriĉa broŝuro de Komercas Ĉambro konate al nia membraro!

Atendu pli atente pro tio, ke la internacia lingvo ludas gravan rolon en la tuto!

RECENZO.

Du-lingva revuo sciencoteknika.

Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj; la Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, (la STEA sub ĈAS), Beijing, (Pekino), Ĉinio. N-ro 1, 1985, (aperos kvar-foje jare); rekte abonebla ĉe la eldonanto.

Tiu ĉi du-lingva revuo pri, en la plej vasta senco, la sciencoteknika kampo de homa pensado, debutis kun imponaj salutmesaĝoj diversaj, inkluzive de tiu de la (ne-Esperantista) Vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, kaj kun bondeziroj de tri Esperantistoj el diversaj landoj. La enhavo estas tre varia: la nivelo de la kvin studoj sub la rubriko, 'Scienco-Evoluo', estas impone alta, kaj la tri pli ĝeneralaj artikoloj represitaj el la E.-gazetaro estas trafe elektitaj. La ceteraj artikoloj estas kune serioza pledo por konstato de la ideo, ke Esperanto povas kaj devas ludi rolon pli gravan en la kampoj de scienco kaj tekniko.

La tuto estas prezentita per senerara lingvaĵo, facile legebla; via recenzanto aparte laŭdas la altan kvaliton de interpunkciado kaj tipografio.

La ĉinlingva enhavo estas evidente traduko de la ĉiam apuda teksto; se tio signifas, ke la revuo nombras inter la legantoj sciencistoj ĉinaj kiuj ne legas Esperanton, ankaŭ tion ni laŭdu. Sub la rubriko, 'Esperanto-Forumo', aperas klaraj alvokoj de la sciencistoj de Ĉinio, senrigarde al la aparta fako, al preno de la i.l.-n kiel komunan lingvon por la interŝanĝado de ideoj, aparte en la koncernaj kampoj. Per klaraj vortoj, la voko estas unue ellerni la lingvon kaj poste ĝin apliku en la praktiko.

Ne nur la revuo mem sed ankaŭ la STEA sub ĈAS meritas nian senhesitan subtenon; ni bonvenigas tion ĉi novan iniciaton.


lm

- - - - - oo - - - - -

Ne estis momente priskribi la plezuron, kiam ni sentis pro la pluraj salut-artoj kaj -remedoj ricevitaĵoj pro la "mal-est-esteno, sed ni pensas, ke tiu ĉi bildo meritigas pli vastan diskenigon, kaj tial per publikigo de ĝi ni povas esprimi niajn sincerajn dankojn al tiuj bondezirantoj.

La bildo estas reproduktite originalo en parisa muzeo, de la artisto Henri Rousseau, (1844-1910),

kaj pli la solena rajdveturilo de la Familio Junier. Ni ricevis ĉin de la Estraro en Francio, kun la demando, "Ĉu tia estas la nuna ĉaro de la Estraro de IKEP?". Verŝajne aŭtomobilo estas pli oportuna por moderna veturado, sed se la kaso ebligas al ni akiri ĉi tiun mal-rapidan sed sendube efikan portilon, ne forgesante la belan ĉevalon, ni sentus malpliigon de veturadproblemoj, ĉu ne?



**Varo kun limigita apliko --
sed kun interesa priskribo.**

El Sofia en Bulgario venis al ni propono menci en niaj paĝoj iniciaton kun aparta intereso. La propono venas de filio de la Bulgara Esperantista Asocio, entrepreno nomita Ekonomia Direkcio 'Globus', la celo de kiu etendas ĉis produktado de diversaj varoj por grand-skala konsumado.

Pri unu el tiuj varoj, la entre-

preno invitas informpetojn cele al eksportado. Pri la kvalito, prezo, vendkondiĉoj, kaj tiel plu, ni nenion scias, sed la priskribo de la varo estas certe interreskapta, ni pensas.

La varo nomiĝas ANTITAB; ĝi estas kuracherba cigaredo, vendata en pakajoj de dudek cigaredoj.

La propono de tiuj cigaredoj estas direktita al personoj kiuj jam, pro iliajn kialoj, desiras liberiĝi de tabakumado. Uzado de

la cigaredoj kreas provizoran mallogon por aŭ naŭzon kontraŭ tabakfumo.

La rezulto plej ofte estas sento de satigo kontraŭ la nikotino, kaj maldeziro plu fumi. La koncerna sento daŭras du ĝis tri kaj duono horoj; laŭokaza uzado kontribuas al sendolora kaj senkriza transpaŝo de la nikotina malsato.

Tion priskribas la proponantoj de la cigaredoj, kiuj aldonas la sciigon, ke la kurakurso bezonus eble kvin ĝis dek pakajoj. Interesitoj bonvolu skribi private, menciante la Laŭokaza-Novajleteron, al: Ekonomia Diekcio Globus, Str. Neofit Rilski 32, 1000 Sofia, Bulgario.

Interŝanĝo de ideoj.

De la eldonisto de la Informilo por Interlingvistoj, (al kiu revuo ni faris aludon en la ĵus-antaŭa Novaĵletero), ni ricevis klaran inviton proponi la nomojn de interlingvistaj fakuloj inter nia membraro regule kaj senpage ricevi la Informilon. Volonte ni transdonos nomojn sekve de petoj viaj!

Nian atenton kaptis nova internacia revuo el Sud-Ameriko, redaktata de aktiva Esperantisto konata kiel Peranto de UEA por Kolombio kaj iama gasto ĉe ni en Roterdamo. 'Andaj Ondoj', laŭ propra priskribo modesta esprimorano latinamerika, donas novan sloganon al ni: Ni provu pruvi, ke ni pravas! Kaj tiu modesta organo atentigas nin pri abundo de vivantaj pruvoj pri la plifortigintaj E.-instancoj en tiu mondparto, ofte priskribita kiel la 'tria mondo'.

Oni asertas, ke la disvastiĝo de Esperanto en tiu 'mondo' fariĝas kaj fariĝos pli kaj pli granda.

Tiu revuo meritas nian atenton kaj nian aktivan subtenon. (Cetere, tiu modesta organo estas tiel bele presita kaj ilustrita, ke oni facile pardonas la kelkajn peketojn kontraŭ gramatikaj reguloj.)

Lastatempe, ni plurfoje ricevis sciigojn pri trafikaj agoj de membroj niaj, aktivado tute laŭ nia ardo-

plano. De Hongkongo ni eksciis, ke nia membro tie ricevas informojn pri livereblecoj de varoj, kaj ke la informpetantoj mencias iun aŭ alian ligon kun IKEF.

Du-foje ni eksciis pri publikaj proponoj, flanke de membroj niaj, akcepti komisionojn traduki tekstojn por reklamprospektoj, uzinstrukcioj, kaj tiel plu. Membro nia en Okc. Germanio montris al ni prov-eksempleron de nove tradukita turistbroŝuro pri la propra urbo, kaj ricevis kuraĝigajn vortojn de ni pri la rezulto.

Por revuo MONATO, nia Prezidanto akiris du pliajn mendojn de reklam-anonco flanke de konataj entreprenoj, kaj li petis nin denove atentigi niajn memorojn pri la granda utilo por la E.-Movado de tia varbagado. (Parenteze, nia Financa Konsilanto aldonas, ke la kurtaĝoj por tiuj reklamanoj venis al la kaso de IKEF, sekve de propono de la vera varbinto; tiaj enspezoj estas ĉiam aparte varme bonvenigitaj. La ceteraj membroj bonvolu imiti nian Prezidanton!)

Ni kaptas la okazon memorigi la membraron pri la eblecoj, kaj senpage aperigi anoncon mallongan en la LN-o mem, kaj proponi la eblecon malmultekoste aperigi anoncojn komercajn tien.

Jam en pli frua LN-o ni petis sciigon pri planoj de niaj membroj partopreni en la Universala Kongreso en Pekino, Ĉinio. Laŭ la ĝisnunaj informoj, nur tri de niaj membroj estos tie, sed de du aliaj ni informiĝis pri planoj fari decidon nur pli apude al la dato.

Nia Prezidanto vere volas okazigi kunvenon en la kadro de la Kongreso, se ĉeestus eĉ modesta ĉeestantaro, kiu povus subteni lin en varbagado. Ni rekomendas al ĉiuj Membroj akcepti inviton al tia kunveno, se iel vi povas trovi la eblecon partopreni en la Kongreso.

Ponto de enspezo, kiu ĝis nun nenion enspezis por ni, estas la granda kvanto de uzitaj poŝtmarkoj jam kuŝanta ĉe ni, pro nia vasta korespondado kun multaj diversaj landoj. Se iu Membro nia havas la eblecon 'konverti' tiajn poŝtmarkojn en enspezo por ni, ni grande ĉojus.

paĝo ok

REKLAMANONCOJ

REKLAMANONCOJ

REKLAMANONCOJ

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive
ses linioj: senpage;

por pli longaj anoncetoj:
po 1 respondkupono, (irpk),
por ĉiuj komenciĝantaj ses
linioj.

Ĉiam unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ
por ĉiuj tri milimetroj de
longeco, enkadrigita,
sed kun minimumo de ok
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.
Por anoncoj je pli granda
larĝeco ol unu kolumno:

laŭ aparta interkonsento.

Ĉiam: tri aperoj de la sama
anonco en sinsekvaj kajeroj
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 0,90 gld.

RE-SANIGO DE BETONO

per reakciaj rezinoj.

Indiku viajn problemojn!
Senpage informos vin: Hans
Wiersch, Irlsita strato 39,
7063 Welzheim, Okc. Germ.

'Labores con Cabos'; verko
en la hispana pri nodoj kaj
ŝnuroj por alpistoj, mont-
istoj kaj skoltoj.

Vendejo RISKO, Apdo. 7.009,
41080 Sevilla, Hispanio.

Ekonomiisto en Hungario
pretas akcepti gastojn el
aliaj landoj cele al faka
konversacio: S-ro József
Szabo, Dr Csanádi krf.
15-17.I/15, 5000 Szolnok.

Tiu

ĉi

spaco

estas

rezervita
por vi!

La Stelo.

La valida kurzo por la Stelo
nunatempe en Nederlando
estas: 1,00 egalas
al 1.360 Steloj.

Petu kurzojn por aliaj lan-
doj de Mndk. Eld. Esperant-
ista, Postbus 25041,
3001 HA Rotterdam,
Nederlando.

La Baza Kurso en Esperanto,
de Audrey Childs-Mee;
la plej efika metodo instru-
kursanaron. Eldoninto
Mondk. Eld. Esperantista,
P.O. Kesto 25041, Rotterdam

Esperanto

lingvo internacia

Reklami estas informi;
ju pli vi informas,
des pli vi vendos.
Uzu la senkoston servon de
via propra komunikilo:
La Laŭokaza Novaĵletero.

Pri pagoj al ni.

IKEF ĝis nun ne havas apartan
bankrilaton, sed utiligas por ĉiuj
financaj traktaĵoj konton en la
kontaro de Mondkomerca Eldonejo
Esperantista, ĉe la adreso:

P.O. Kesto (Postbus) 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Tiu Eldonejo tenas poŝtĉekkonton,
numero 361 47 95, ĉe la nederlanda
poŝtĉekinstanco.

Membroj de IKEF pagas jarkotizon
je dudek guldenoj, por la kalendara
jaro. Cele al relativa malaltigo
de kostoj kaj laboroj, ni ĉiam kon-
silas al pago por kelkaj jaroj en
anticipo. Anticipa pago por dudek
jaroj aŭtomate provizas membrecon
ĉurvivon.

Loĝantoj en landoj sen pagomal-
facilaĵoj, kutime povas aĉeti int-
ernacian poŝtmandaton ĉe la poŝt-
oficejo, kaj tiel sperti la plej
malmultekostan metodon fari trans-
pagon. Adresu tiam internacian
poŝtmandaton al la Eldonejo, kun
mesaĝo, 'por IKEF'.

Se vi, loĝanto en tia lando,
tenas mem konton ĉe la poŝtĉekinst-
anco en via lando, vi povas fari
transpagon tra tiu poŝtĉekinstanco.
Informpetu mem ĉe la poŝtoficejo!

Foje oni volas fari pagon per
uzado de internaciaj respondkup-
onoj. Tio estas relative multe-
kosta metodo, sed foje la plej ef-
ika. La kosto de jarkotizo est-
dudek tri internaciaj respondkup-
onoj.

Se neniu alia ebleco disponiĝas
al vi, tiam faru pagon pere de
bankĉeko, sed al la persona nomo de
S-ro L. Mee, kaj tiam aldonu sep
kaj duono da guldenoj por kovri la
ne-eviteblajn enkasigokostojn.

Tre multekosta metodo fari pagon
de modesta sumo!

Lasta ebleco estas fari pagon
tra Universala Esperanto-Asocio,
ankaŭ en Rotterdam. Faru mencion
de la nomo, Int. Komerca kaj Ekono-
mie Pakgrupo, kaj UEA aŭtomate el-
pagos la sumon al ni.